

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1972 1

KULTURAJ KAJEROJ

1972 JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Renaskiĝo de la orgeno

La vivo ĝis la limoj de la neeblo

Henri Micard kaj la Esperantista

Kulturdomo F. Thébaud

Gabriela Mistral tradukis E. Motillon

Fantaziulo

Nia konkurso P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Kiam vi vizitas Gresillon vi verŝajne konstatas ke tiu ĉambro estas pli bela, pli komforta, ke nun la varma akvo faris kelkajn pliajn paŝojn al nova angulo, ke dank'al la modernigo de la kuirejaj instalaĵoj la kvalito de la manĝoj kaj la servado pliboniĝis. Sed ĉu vi rimarkas, ke la parko pliriĉiĝis ? Ankaŭ ĉi jare pli ol 50 novaj arboj kaj arbetoj kreskas ĉirkaŭ la kastelo. Iom post iom la plano farita de nia amiko Pierre Métivier realiĝas. Dank'al li vi trovos ankoraŭ pli da plezuro en la parko. Tiu ĉi estis jam fama pro la diverseco de la specioj de la kreskaĵoj. Nun de tri jaroj novaj specioj aldoniĝis kaj pliriĉigis la « juvelujon ».

La jaro 1971 estis bona jaro. La nombro da vizitantoj, ĉefe da eksterlandanoj estis pli granda ol en 1970. Konsekvence ankaŭ la enspezoj plialtiĝis. Tio permesis al ni antaŭvidi novajn plibonigojn. Granda estas nia ĝojo, kiam ni povas diri al laboristoj : « Faru tion kaj tion », ĉar tiam realiĝas jam de longe dorlotita revo.

Kiom da revoj kuŝas en la dosieroj ! Helpu nin, amikoj, realigi tiujn revojn iom post iom. Venu, venigu viajn amikojn. Ni ŝatus, ke ankaŭ jare la kastelo estu plenplena. Ni esperas, ke je la fino de la jaro ni povos anonci al vi, ke ni starigis novan rekordon.



TUJ PETU NIAN PROGRAMON.

TUJ REZERVU VIAN ĈAMBRON.

Esperanto tra la Mondo

ĈU VI IROS AL LA UNIVERSALA KONGRESO EN PORTLAND ?

— La grandaj aerkompanioj decidis redukti la prezojn por la vojaĝoj super Atlantiko. Ni memorigas ke U.E.A. organizis specialan internacian karavanon inter Amsterdamo kaj Portland en aviadilo tiucele luita.

— La ĉeftemo de la kongreso estos : « Monda turismo kaj lingva diverseco ». Pedagogia temo estis elektita por la debato : « La valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj ».

— La oratora konkurso por junaj homoj ĝis-28-jaraj havos jenajn temojn : 1) Turismo kaj konservado de la naturo ; 2) Kiel atingi ke turismo efike kontribuu al kulturaj interŝanĝoj ; 3) Esperanto kaj la moderna junularo.

LA KONGRESO DE S.A.T. EN FINNLANDO

La 45a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.) okazos de la 22a ĝis la 28a de Julio en Kuopio, en centra Finnlando. La post kongresaj ekskursoj direktiĝos al Leningrado kaj Nordkabo. Adreso : O.K.K. p/a Lingvoponto, P.f. ; 119, SF-70101 KUOPIO 10 (Finnlando).

EN FRANCIO

— La nacia kongreso de Unuiĝo Franca por Esperanto (U.F.E.) okazos en Nantes, dum Pasko (31a de Marto ĝis 4a de Aprilo). Adreso : S-ro Prevot, 53, rue de la Coquetterie, 44-Nantes.

— La S.A.T. - amikara kongreso ankaŭ okazos dum Pasko, en Narbonne. Adreso : P. Loubic, Verda Stelo, route de Carcassonne, F-11 Narbonne.

ANKORAŬ ALIAJ INTERNACIAJ RENKONTOJ.

— Tendaro por gejunuloj, 27-7 - 1-8, sub la moto : « La junularo de la tuta mondo akuzas la imperiismon ! », en Karl-Marx Rabenstein, Germana Demokrata Respubliko (Ekskurso al Dresden, ktp.). Adreso : Esperanto-klubo DKB, DDR-90, Karl-Marx-Stadt, Postfach 551.

— Ornitologia semajnfino sur la insulo Texel, la « birdparadizo » (Nederlando), 11-14 a de Majo. Adreso : Ru Bossong, Floraplein, 23, Eindhoven, Nederlando.

— Internacia Esperanto--Feriado en Mieddzyzdroje (Pollando), 18-29 a de Junio Adreso : Turisma Oficejo « Gramada » Pl. Lotnikow 7, Szczecin.

— Laborkampo por gejunuloj, en Roccasecca (Italujo), 15-31a de Julio (reordigado de mezepokaj masonajoj, nur matene). Informoj ĉe G. Molle, c/o G. Germani, Via dei Danni 2, sc 20, int. 7, Roma (Italujo).

— Internacia kongreso-renkonto en Antverpeno (kun belga kaj Markola kongresoj), kiun interesaj ekskursoj kaj prelegoj, 28 a de Aprilo — Ia de Majo. Adreso : J. Verstraeten, St-Bernardsesteenweg 1078, B-2710 Hoboken (Belgujo).

DUM LA OLIMPIAJ LUDOJ EN MUNKENO.

Se vi iros al la olimpiaj ludoj, anoncu vin ĉe S-ro Horst Spirat, Arnulfstr. 22/4, D-8 München 2.

Bavaraj esperantistoj klopodos por starigi informstandon pri Esperanto kaj por Esperantistoj.

Por disdoni broŝurojn pri internacia lingvo al la sportistoj, estis starigita « Fonduso Olimpiaj Ludoj ». Administras ĝin Ludwig Pickel, P.f ; 2113, 85 Nürnberg 2, kiu ricevas mondonacojn.

NIAJ LIBROJ

— Poŝatlaso de la mondo en Esperanto. Ĝi entenas 80 plurkolorajn mapojn kaj pli ol 12 geografiajn nomojn (eldonita en Praha).

— La kremo de Kalocsay. 28 originalaj poemoj kaj 40 tradukoj de nia granda verkisto. Ĉion kion vi devas esti minimume leginta de li !

— « La reto », de Bukar. La bona teatrajo lasttempe ludita kun sukceso en Parizo, dum pluraj semajnoj.

— « Viktimoj — Sur sanga tero ». Reeldono en unu volumo de du teme interligitaj romanoj originalaj de Julio Baghy.

— « La internacia kuirlibro ». Kompilis S-ino J. Shorter-Eyck. 500 receptoj el 100 landoj !

— « Ni ludas teatrajon » de E.V. Tvarozek, 4 unuaktajoj por la klubvesperoj.

— « Apenaŭ bukedeto » de Roger Bernard. Poemoj tradukitaj el la franca literaturo.

PORESPERANTA AGADO EN TORINO

— En Torino (Italujo), oni instalis modernan « Esperanto-centro » kun publika informoficejo, biblioteko kaj kunvenejo.

— Aperis 1.000 afiŝoj en ĉiuj fabrikoj kaj oficejoj de F.I.A.T., je kosto de ties kultura por-laborista instanco.

— Esperantistaj gejunuloj kontaktis la studentojn de Perfektiga Profesia Centro. Pli ol 50 junaj afrik-aziaj kaj sudamerikaj edukistoj kaj teknikistoj tiel aŭskultis 3 debat-prelegojn pri Esperanto, en angla, franca kaj hispana lingvoj. Tiu agado estos ripetita.

LA TELEVIDA KURSO EN NEDERLANDO

Ĝi okazas dimanĉvespere de la 18.20 ĝis la 18,50 horo kaj estas ripetita vespere dum unu tago de la semajno. Du komediistoj ludas skeĉojn en la kadro de la leciono.

RENASKIĜO DE LA ORGENO

Hodiaŭ, kiam oni vizitas preĝejon, oni admiras ne nur kapitelojn, altaron aŭ kripton, sed ankaŭ, ofte, la orgeno-meblaĵon. Koncertoj, festivaloj redonas vivon al la orgenoj de niaj preĝejoj. De jam kelkaj jaroj multaj mikrokaneloj permesas disaŭdigon de orgeno--muziko ĝis en niaj hejmoj.


Sinjoro Duruflé, orgenisto, diras : « En nia mondo ĉiam pli frenezema, la orgeno-muziko alportas al ni kvietigon ».

Estas stranga instrumento : pluraj klavaroj kaj pedalklavaroj pliigas ĝian potencon ; sed ĝia komplekso estis havigita nur laŭlonge de la jarcentoj. Jen teknika difino de Curt Sachs : « Estas blovinstrumento konsistanta el tuboj kun ĉiu unu nura noto ; ili estas agorditaj laŭ difinita gamo, nutritaj per blovilo kaj funkciigataj per unu aŭ pluraj klavaroj ; Ĝi portas en si la fluton de Pajno (tuboj kun unu sono), la sakfluton (blovilo) kaj la fortepiano (klavaro). De jam 10 jarcentoj ĝi estas preĝeja. Nur ĝia potenco, ampleksigita laŭlonge de la tempoj, povis plenigi la volbojn de la Di-domoj, kovri la homajn voĉojn kaj trudi ĝian ĉeeston. Tamen ĝi naskiĝis antaŭ la krista erao ; dotita je komplika blovilo kun hidraŭlika sistemo, ĝi estis jam konata de la Grekoj kaj Romanoj. La bizancaj Imperiestroj ĝin transportis dum siaj vojaĝoj kaj eĉ Konstanteno la V-a donacis unu orgenon al Pipino — la Malgranda. Je tiu epoko la ekleziuloj ne multe ĝin taksis ; ili hezitis : eble, kantoj kaj muziko estis manko de respekto al Dio ; tial, nur diskrete kaj post longa ĉeesto ĉe la kortegaj distraĵoj, ĝi eniris en la preĝejojn.

Intertempe oni anstataŭigis la akvon, kiu estis regulilo por la aerrezervujo, per bloviloj movigitaj per la mano de blovistoj, dum la orgenisto ludis. Ĝi pli kaj pli perfektiĝis por pli impresi la publikon ; ĝia rolo fariĝis didaktika.

Je la sama periodo la skulptistoj skulptis sur la muroj de la katedraloj aŭ demonojn kaj « lastajn juĝojn » aŭ serenajn ĉielajn idiliojn por la ŝaĝuloj. Dume la orgenoj ricevis son-perfektiĝojn, kiuj permesis aŭ timegi kaj superpotenci, aŭ kvietigi kaj elvoki la terenecojn de l'paradizo. Sub la volboj kaj akustikaj meandroj de la religia arkitekturo la orgenoj plen-plene plenumiĝis.

Oni provis uzi orgenon ĉe la modernaj koncertoj : en Radio-Domo oni konstruis plej pompan orgenon ; malgraŭ ĉiuj perfektigadoj, ĝi ne sukcesas doni muzikon tiel grandiozan, kiel faras la orgenoj pli arkaikaj de kelkaj katedraloj. « Tial, diras S-ro Duruflé, la komponado de tia muziko estas ĉiam adaptita al la konstruo, kiu entenas la instrumenton ; kun la sama komponaĵo, se ni ŝanĝas la lokon aŭ la instrumenton estas ĉiufoje rekreado. Malofte ni estas plene kontentaj ; sed ĉiu orgeno alportas al ni novan intereson, novan riĉiĝon dank'al la diverseco de la instrumentoj ».



Estas inter la XIII-a kaj la XVIII-a jarcento, ke la orgeno, de mutacio en mutacion, pli progresis.


De la delica « hirundo-nesto » pendigita ĉe la muro de « nia amo de Valere » en Sion (Svisujo) ĝis la « granda 16-piedoj » de Cliquot en la katedralo de Poitiers, la orgeno ne ĉesis ampleksiĝi kaj perfektiĝi dank'al la teknikaj inventaĵoj ; ĉar plej necesis novigi !

La « portebla » orgeno, kiun oni transportis per ŝultrozono, baldaŭ fariĝis « nemovebla », pro ĝia tro granda volumeno. Antaŭe ĉiuj tuboj estis samdiametraj ; nur ilia longo modifis la sonon ; poste ankaŭ ilia diametro malsamiĝis. Kreado de klavaro permesis unu nuran orgeniston dum la blovistoj manipulis la blovilojn. Kaj, ĉar la katedraloj pli kaj

pli vastiĝis, la orgeno-fabrikantoj adaptiĝis al tiu vasteco.

En la XIV-a jarcento aperis la « Granda Orgeno » ; ĝiaj sonorecoj estis pli fortaj. Post la klavaro oni inventis la pedalklavaron, la akcesorajn klavarojn kaj la eblaĵon « teni » la bordunon ; kaj oni riĉigis la muzikecon de la tuboj. La antikva « nemovebla » orgeno staris ie en la preĝejo : aŭ ĉe la ĥorejo aŭ sur la jubeo ; kiam oni instalis la Grandan Orgenon, la orgenisto devis translokiĝi de unu al la alia. Poste oni sukcesis ilin pendigi ĉe la sama balustrado ; tiam la muzikisto povis laŭplaĉe ludi sur la du instrumentoj.

Post la Mezepoko oni okupiĝis pri ĝia ŝirmaĵo ; ĝis tiam ĝi estis kovrita per nura tolo por ĝin protekti kontraŭ polvo. Baldaŭ oni enfermis ĝin en meblaĵo, kies dekoracio estas kelkfoje pli valora ol la instrumento mem. Estas la momento, kiam la klasika orgeno atingas sian apogeon. Malgraŭ la Kontraŭ-Reformo-Krizo, orgeno-konstruantoj kreas instrumentojn, kies tonalecoj ankoraŭ hodiaŭ mirigas nin. Tiu kreado estas metiista kaj familia. Jen en Alsace la du fratoj Silbermann, en Poitu patro kaj filo Cliquot, en Languedoc Cavaillé-familio. La fino de la XVIII-a jarcento markas la triumfon de tiu instrumento kun François-Henri Cliquot en Poitiers, Jean-Baptiste Lefebvre en Rouen kaj Nevers, Dom Bedos de Celles en Bordeaux (la libro de tiu ĉi pri orgeno ankoraŭ hodiaŭ estas plej valora). Dum Revolucio kaj Restaŭrado la orgeno estis iom forgesita ; meze de politikaj perturboj, la religa muziko ne havis lokon. En la Romantika Epoko ĝi eliris el sia torporo. Denove ĝi profitas teknikajn novaĵojn ; la instrumento fariĝas orkestro ; ĝi imitas hobojon, trumpeton, klarneton. En 1841, en S-t Denis Sinjoro Aristide Cavaillé-Coll aŭdigas orgenon tute novan ; ĝiaj eblaĵoj estas multaj kaj ankoraŭ pli multiĝos ĝis fino de la jarcento.. Certe la instrumento estis pli facile manipulebla sed ĝi perdis sian personecon ; ĝi havas siajn adeptojn kaj komponistojn. La klasika orgeno havis J.-S. Bach, la romantika trovas en Cesar Franck sian kantoron.



Sed estas nia moderna epoko, kiu hezitas ; kiun elekti : la klasikan aŭ la romantikan ?

« Ni ŝuldas al Albert Schweitzer, diras Pierre Hardouin, la renaskiĝon de la orgeno ». Fakte, A. Schweitzer certigis, ke oni ne plu povas interpreti la XVIII-a jarcentan muzikon sur la modernaj orgenoj. S-ro Hardouin precizigas « Ni devas fabriki malsamajn orgenojn adaptitajn al preciza muziko ; orgeno ne povas esti plurcela ».

Nune granda fervoro kun siaj kvereloj, siaj diferentaj skoloj donas al orgeno novan vivon ; ĝia muziko, forpuŝita de la moderna liturgio, por la malĝojo de kelkaj kaj la kojo de la aliaj eliras el la kanonaj volboj ; ĝi ne plu estas la emfaza muziko de la nuptaj marŝoj : « Ni volas fari veran muzikon, ni serĉas perfekton ».

Laŭlonge de la jarcentoj urboj kaj kelkaj vilaĝoj ricevis mirindajn orgenojn. Ilin ripari kaj konservi proponas problemojn. Tiu instrumento devas esti reviziata ĉiujn 20-jarojn. Granda riparo devas okazi ĉiun jarcenton : la uzita metalo ne povas pli longe rezisti, precipe al kolomboj kaj vespertoj. Sed estas metiista laboro, kiu postulas tempon kaj pedantecon. Por monumenta orgeno de katedralo oni bezonas multajn jarojn kaj plej kompetentajn metiistojn. La respondeca Komisiono ofte hezitas : « ĉu konservi la antikvan orgenon ? ĉu ĝin transformi ? Ekzemple, en malgranda vilaĝo oni malkovras tre malnovan orgenon de la XVII-jarcento : « tre bela ! diras la Komisiono, oni faras neniun transformadon ». « Sed, respondas la pastro, mi havas neniun kapablan funkciigi la blovilojn ! » Kion fari ?

Nune, ĉie, oni organizas koncertojn, festivalojn. Nenie la orgenoj lasas la aŭskultantojn indiferentaj. Senkorpa estas tia muziko. La instrumento kaŝas la orgeniston. Certe oni admiras la virtuozecon de Pierre Cochereau aŭ tiun de Michel Chapuis ; sed, ankaŭ, oni deziras aŭdi la orgenojn de « Nia Damo », tiujn de S-t Eustache kaj S-t Severin ; kaj, ĉar orgenoj estas ankaŭ ĉef-artaĵo, oni admiras la meblaĵojn de Uzès, de la Chaise-Dieu, de Dole. Monumento, Instrumento, orgeno estas tutaĵo, kiu indas vivi !

LA VIVO ĜIS LA LIMOJ DE LA NEEBLO

De la neĝo de la plej altaj montoj ĝis la nokto de la grandaj abismoj, la VIVO, dum proksimume 3 miliardoj da jaroj disfluis ĉien sur nia globuso. Eĉ kelkaj organismoj vivas en sulfuro, en petrolo, en vinagro, eĉ en gejzeroj kaj sendube en la nuboj. Ilia studo permesas fiksi la ekstremajn eblajojn de la VIVO.

La Vivo estas abunda, invadema : virusoj, bakterioj, plantoj, bestoj instaliĝis en ĉiaj ajn medioj. Tamen ni, ĝis nun, opiniis, ke ĝi renkontas limojn. Tiu opinio kondukis nin al steriligo per bolo aŭ surradiado, al senradikigo de nocaj specioj per D.D.T., al « mortigilo kontraŭ ratoj », kaj ni ne forgesu, ke niaj homaj aktivajoj kreas novajn insidojn, novajn malfavorajojn. Malgraŭ kaj kontraŭ ĉio estas specioj, kiuj prosperas plejkerne de lokoj treege polueitaj. Ili, dank'al mil biologiaj artifikoj, elturnas sin el la vivo--neebleco. Konsekvence estas malfacile precizigi, kio estas « biosfero ». Tiu studo permesos klarigi la kondiĉojn de « Postvivo » tra la Evoluado kaj pliboniĝi la vivmanierojn de la ordinaraj vivantajoj.

Sur montoj, vivantajoj atingas la plej altajn altitudojn. Sur Alpoj eta neĝo-kampomuso vivas je 4.700 m. ; ĉe Andoj, esploristo Humbold observis kondoron : je 6.600 m. ĝi estis nur nigra punkto sur la blua ĉielo. Plantoj kreskas je 6.400 m. sur Himalajo. Oni trovis simiojn je 4.000 m., lezardoj je 5.000 m., sovaĝkaproj kaj... helikoj je 5.550 m. « Lagomisoj » (parenco de leporo) vivas je 6.000 m. Ĉe la birdoj la montkorvo (ofte malprave nomita monedo) flugas pli alte ol 6.000 m. ; ĝi alproksimiĝas ĝis la monto-domoj, almoz-petante nutrajon. La sovaĝaj anseroj, kiuj iras de Siberio al Hindujo superflugas Evereston, meze de neĝo-ŝtormoj.

La gruoj superflugas Francion je altitudo 5.000 m., tute nevideblaj eĉ sur belege blua ĉielo. Tiuj flugadoj, kiuj jam okazigis akcidentojn, timigas la aviadistojn.

En atmosfero, ne nur birdoj ĉi tie cirkulas. Oni renkontas insektojn, araneojn ĉi tien transportitajn de filandroj ; kaj jen ankaŭ grajnoj, sporoj. Tute freŝdate la biologoj interesiĝis pri nuboj. Sinjoro Bruce C. Parker, usona serĉisto, pli speciale studas polucion de la akvoj. Li inventis aparaton por ekzameni la organikajn substancojn solvitajn en akvo : precipe la vitaminon B-12. Li lokis sian aparaton en simpla baseno, kie naĝis ruĝaj fiŝoj ; kaj li konstatis, ke la denseco de vitamino B-12 subite pliiĝis post fulm-tondraj pluvoj. Multaj eksperimentoj kondukis al tiu konkludo : la pluvakvo estas multe pli riĉa je organikaj substancoj ol sama kvanto de mara-aŭ-laga akvo. S-ro Parker opiniis necesa studadon de la nuboj : la tiea humideco estas favora al vivo kaj la suna lumo povus tie ĉi okazigi fotosintezon. Parker uzis T.T.C. ; ĝi estas kemia produkto flava, kiu kolorŝanĝiĝas, kiam ĝi estas en kontakto kun vivantaj ĉeloj ; ĝi iĝas rozkolora. Oni do trovis en nuboj vivantajn organismojn, precipe mikroskopajn algojn, kapablajn fiksi karbonan dioksidon, kiam ili ricevas lumon : alidire ili efektivigas fotosintezon : estas pruvo, ke ili estas bone vivantaj kaj ne en malakcelita vivo-stato.

En abismoj : la abismaj organismoj enprofundiĝas ĝis pli ol 10.000 m. La mikroorganismoj ĉi tie malkovritaj vivas sub premo je 700 aŭ 1.000 atmosferoj ; ili mortas sub « normala » premo.

Sub tero, grotoj ŝirmas algojn kaj, precipe, fungojn. Biospeleologio ilin studas. Pli malofte vivantaj estajoj troviĝas en minejo. Tamen oni devas citi tiujn paserojn, kiuj nestis en angla karbominejo 100-m-profunda kaj kiujn la ministoj nutris.

En varmegaj medioj estajoj vivas sub terura suno kaj sur brulega sablo.

En varmaj akvoj : Jam Pline estis skribanta : « Verdaj herboj kreskas en la varmaj akvoj de Padovo kaj ranoj loĝas en tiuj de Pizo. Sinjoro T.D. Brock, profesoro pri mikrobiologio faris observadojn en la parko de Yellowstone, kiu estas riĉa je gejzeroj kaj varmaj fontoj. Oni devas ekzakte detekti la ĝustan lokon kaj temperaturon kie loĝas kelkaj specioj. Loko kaj temperaturo estas tiuj, kiuj konvenas al diversaj vivkondiĉoj : lumo, nutraĵo, pH (pH = koncentreco je hidrogenaj jonoj) K.T.P. En Yellowstone la varmaj fontoj konstituas « tropikajn enklavojn » en sektoro, kies klimato estas rigora kun neĝo dum vintro. Kiujn specioj oni renkontas en tiuj varmaj akvoj ? Signoj ilin trairas : libeloj ilin preteflugas, superflugas, tre atentante ne fali : estus morto. Kelkaj araneoj konstruas sian araneajon super la akvoj por kapti insektojn, precipe specialajn muŝojn : la « efidra-oj ». Tiuj « efidraoj » vivas supraje de la varmaj fontoj ; eĉ kelkfoje ili en ilin plonĝas por sin nutri, protektitaj de aerveziketo. Ilia nutrajo estas bakterioj kaj precipe algoj, ĉeestantaj ĉi tie. Dum bestoj kaj insektoj ne postvivas temperaturon pli ol 51° C la « veraj » algoj povas elteni 60° kaj la bluaj algoj 75° kaj la bakterioj pli ol 90°. S-ro Brock konstatis ke tiuj bluaj algoj pli bone « fotosintezas » je tiuj altaj temperaturoj. Li demandis sin, kiamaniere la estajoj povas vivi en tiel altaj temperaturoj dum proteinoj denaturiĝas ĉe temperaturoj pli malaltaj. Li povis montri, ke la organismoj vivantaj en tiuj varmaj akvoj havas enzimojn speciale rezistantaj : en ili ribozoj kaj mekanismo de sintezo ĉe proteinoj estas pli stabilaj. Do, aliloke oni devas serĉi la mortokialon de la ordinaraj organismoj ; ŝajnas, ke tio situiĝas ĉe la ĉelo-membrano : varmo provokas en ĝi lezojn (veraj truoj) kaj poste detruon de ĉelo.

En malvarmegaj medioj : En Arkto, en Antarkto primitivaj insektoj vivas. La « Kolemboloj » vivas supraje de la glaciejoj. Fiŝoj naĝas en polaj akvoj (— 1,9° C). La cirkulad-aparato bone funkcias dank'al surfandiĝo-fenomeno, kiu permesas al sango resti likva anstataŭ frostiĝi.

En Kemiaj kaj toksaj medioj, vivi ŝajnas al ni neimagebla. Tamen eta vermo, nematodo, longa je 2 mm vivas en la farinogluo kaj ankaŭ en vinagro, eĉ se tiu ĉi entenas 7 % de aceto. Tie kaj ĉi tie ĝi nutriĝas je bakterioj. En vinagro oni ankaŭ trovas larvojn de drozofiloj, kiujn oni multe uzas por la eksperimentoj heredosciencaj. En petrolageto vivas larvoj de « Psilopa » ; kaj la « efridaoj » (jam nomitaj) elektas plej diversajn akvojn (alkalajn, magnezajn, potasajn, kaj borajn).

En sulfuraj akvoj jen la eta krustaco « Ciklopo » « kiu estas vere unuokula) ; ĝi sentas sin bone en la akvoj de Luchon. En 1968, en Albe-banoj, apud Romo, itala plonĝanto, L. Ferri-Ricchi, kun kelkaj serĉistoj efektivigis grandan « Unuaklasajon ». Ĉi tie la Antikvuloj lokis unu el la buŝoj de Infero kaj la Romaj Imperiestroj restadis por flegi siajn reŭmatismojn. Ĉirkaŭ la lagetoj kreskas junkoj, sed la e'aj vertebruloj kaj ronĝuloj, kiuj alproksimiĝas al tiuj bordoj mortas, asfiksiitaj de la gasoj, kiuj kovras la suprajon de la lagetoj.

Tamen tie ĉi vivas diptero — ankoraŭ ne bone konata — kaj kies ciklo disvolviĝas samnivele kun la akvo. La randoj de tiuj lagetoj estas kovritaj de vera felto je bakterioj (pli precize sulfobakterioj) kiuj plezuriĝas en tiu sulfur-medio. Kelkaj samaj bakterioj vivas en sulfuracido densa je 3 % (preskaŭa denseco de niaj aŭto-baterioj).

La Vulkanoj altiras bestetojn : sur la deklivoj de Stromboli svarmas kokcineloj, kiujn oni nombras milope. Tie ĉi kreskas povraj plantoj, facilaj predoj por la afidoj, plej ŝatataj de la kokcineloj. Multaj rabo - birdoj ĉirkaŭflugas la eruptantajn vulkanojn. Ili kredas, ke estas veprejo-fajro kaj atendas, ke la ronĝuloj forfuĝu. En Afriko la jusaj lafo-fluajoj estas rapide koloniitaj de plantoj kaj poste de mamuloj, kiuj instaliĝas meze de lafoblokoj, kutime rigardataj kiel negastamaj.

En salitaj kaj eĉ en hipersalitaj medioj : « Artemia Salina » estas eta krustaco, kiu vivas en salmarĉoj kaj en la saharaj ŝotoj, kie ĝi najbariĝas kun moluskoj. En Usono, en la « Granda Salita Lago » oni trovas « artemiajn » kaj « efidraojn ». Antaŭe la Indianoj manĝis la nimfeojn de tiuj efidraoj, forpuŝitajn sur la lago-bordojn. La sal-denseco de tiu lago estas 222,4 %. Sinjoro Pesson, profesoro en Nacia Agronoma Instituto pensas, ke estas la dikeco kaj rigideco de ilia tegumento, kiuj permesas ilian eksterordinaran rezistemon. « Efidraoj » povas eĉ longe vivi en formolo kaj alkoholo. Oni faris eksperimentojn : oni metas moskito-larvojn en akvon salitan je 10 %. La larvoj pliigas sian osmozan premon kaj forjetas la natrian kloridon per siaj eljet-organismoj. La aminaj acidoj de ilia sanga plasmo reguligas la osmozan premon.

En Palestino la « Morta Maro » entenas 231 % da salo ; ĝi estas tre malriĉa je estajoj (por 2 kialoj : granda kvanto da salo, varmeco de la akvo estas ĉi tie kunigitaj).

Nur unuĉeluloj sukcesas en ĝia ŝlimo, sendube alportitaj de Mediteraneo, kiam tiu ĉi, en la antikvaj tempoj, atingis Jordano-valon.

Senaeraj medioj. — Multaj bakterioj estas neaerobiaj ; ankaŭ protozooj ĉe fundo de lagoj ; eĉ parazitoj inter kiuj la tenioj, kiuj loĝas en la digesta tubo de la vertebruloj. Kelkaj insektoj, kvankam aerobiaj, facile rezistas al asfiksio. La blato povas vivi en atmosfero malriĉa je oksigeno sed riĉa je karbona dioksido ; ĝi rapidigas sian spiran ritmon. La kurkulioj facile eltenas puran karbonan dioksidon dum ili estas asfiksiitaj en atmosfero malpli densigita je tiu dioksido. Fakte tiu gaso, purstata, agas kiel anestezilo, neniigas la spirajn movojn kaj fermas la spirajn aperturojn. Tiamaniere la besto eskapas al asfiksio.

Medioj poluciitaj de la homoj detruas sovaĝajn faŭnon kaj flaŭron. Tamen kelkaj specioj sukcesas adaptiĝi kaj eĉ prosperi ; la « verda algo » (marolaktulo) serĉas ĉi tie azotajn rubojn kaj sulfurajn fermentajojn. Bestoj vivas sur la atoloj de l'Pacifiko, kie okazas atomajn eksperimentojn. En laboratorio skorpioj eltenas surradiadon je 100.000 rad., dum homo mortas sub I.000 rad. Eĉ oni pensas ke kelkaj bestoj mortos, kiam malaperos D.D.T.

Kaj la demandoj estas :

— Kiuj bestoj vivas sur la planedoj, kiuj ŝajnas al ni Neviveblaj.

— ĉiu tiuj ekzemploj permesos al ni vivi aliloke ol sur Tero ?

NE FORGESU

ke vi devas sendi vian reabonon aŭ abonon al via peranto aŭ al :

Pierre BABIN, 13, Bd de la Chauvinière

44 - NANTE S, Francujo
pĉ Nantes 2 813 61

NE SENDU monon el eksterlando rekte al la supra adreso. Tio devigas nin al pliaj elspezoj. Sendu monon pere de la poŝtkonto. Dankon.

grésillon 20-jara

Sub tiu titolo, Kulturaj Kajeroj intencas, en ĉiuj numeroj de la jaro 1972, aperigi artikolojn pri la Esperantista Kulturdomo. Tiuj artikoloj, subskribitaj de diversaj personoj, ebligos pli bonan konon de la diversaj aspektoj de la Esperantista Kulturdomo, laŭ la diversaj vidpunktoj de la homoj kiuj ĝin vizitis.

Tiel, aperos laŭlonge de la jaro, rememorajo pri « Henri Micard kaj la E.K.D. » skribita de S-ro F. Thébaud, « la unuaj jaroj de Grésillon » viditaj de s-ro de Waard, eltirajoj el la Ora Libro de Grésillon kie la vizitantoj skribis siajn impresojn, rapida trarigardo de la ĉiutaga vivo en la E.K.D. per fotoj kaj fine la vidpunkto de nova Grésillon'ano, S-ro Jean-Luc Kristos kiu atestos pri la nuna vivo en Grésillon.

Tiamaniere, ni volas fari, post 20 jaroj da vivado, la bilancon de la naskiĝo kaj de la evoluado de esperantista realajo ankoraŭ unika en la mondo kaj samtempe omaĝi al ĝia fondinto Henri Micard dank'al kiu la esperantistoj povas ie en la mondo, koni la fratecon kaj la rektan interkompreniĝon kiujn celis Zamenhof kiam li kreis Esperanton.

HENRI MICARD KAJ LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Se mi pasigis 20 jarojn en Esperantujo, estas, kompreneble pro la renkonto kun Henri Micard. Lia ĉeesto retenis min, lia ĉeesto, lia fido, lia eksterordinara dinamismo. Estus vera perfido se mi estus lin forlasinta. Post lia forpaso, ŝajnis al mi ke restis nenion por fari.

Mi renkontis Micard la unuan fojon en 1946 en la stacidomo de Grenoble kie mi alvenis por partopreni la Someran Lernejon en Sassenage.

Jam li sentis malfacilajojn por funkciigi tiujn « lernejojn » en la sino de la tiama Esperantista Grupo por la Instruado (poste Grupo de la Esperantistaj Edukistoj). Fakte li, unue, devis trovi lokon kie oni povus akcepti 40 aŭ 50 ĉeestantojn en bonaj kondiĉoj (loĝado kaj laboro), la lernejoj estis pli kaj pli malfacile havigeblaj. Due, la solvo de loĝado en hotelo ne estis taŭga pro la tro altaj prezoj kaj la malbona unueco de la « lernejo ».

En 1951, Micard sukcesis havigi al la « lernejo », post longaj klopodoj, la Centron de Populara Edukado de Houlgate, nur dum 10 tagoj.

Sed jam antaŭ tiu dato, Micard pensis pri propra domo. En siaj unuaj projektoj, temis nur pri loko kie oni povus organizi la « lernejojn » dum 3 semajnoj (en somero). « Poste », li diris, « Oni ŝlosas la pordon ĝis la proksima jaro ».

La ĉi-subaj eltirajoj de la diversaj cirkuleroj kiujn Micard sendis dum li serĉis tiun domon, montras liajn klopodojn.

Io tute mirinda en Micard estis lia entuziasmo kaj lia arto konvinki la aliajn. Ĉiu « malkovro » estis la mirindajo. Sed oni konis la malsukceson de traktado nur kun la papero kiu anoncis novan eltrovon, pli bela ol la antaŭa, pli taŭga, Ktp...

Mi kredas ke la eventoj puŝis lin. Tute certe, se Brûlon, ekzemple, bone taŭgis por somerlernejo ĉiujare Grésillon ne povis esti nur tio.

En siaj mirindaj cirkuleroj, mirindaj pro aŭdaco, Micard elmontris, nekontraŭstareble, helpe de ciferoj, ke la afero estis facila kaj... mondona. Kaj forgesante ke la starpunkto apogis sin sur esperoj, kaj ne sur certecoj.

Esperoj ? Apenaŭ ; ĉar la rilatoj kun la aliaj esperantistaj asocioj ne estis tiel bonaj ke li povis esperi, sen kondiĉoj, tujan apogon.

La afero konkretiĝis en Septembro 1951, en Houlgate.



Micard subtenis, kun neŝancelebla obstineco kelkajn principojn : ekzemple la fakto ke ĉiu akciulo havas nur unu voĉdonon kiu ajn estas la nombro de liaj akcioj.

Mi scias ke lia obstineco senigis lin de financaj subtenoj kiuj estis tre utilaj en la unuaj tagoj.

Micard forpasis. La Esperantista Kulturdomo ankoraŭ vivas, kaj, mi opinias, laŭ la ideo kiun li havis. La homoj kiuj estas tie, li bone taksis ilin (kaj li estis kompetenta) ; li elektis ilin. Ĉu ne estas la pruvo ke li pravis.

Frédéric Thébaud.

CIRKULERO I al la administra konsilantaro

Mi ne kutimas longe insisti pri la pasinteco, kaj, laŭ mi, Brûlon estas la pasinteco. Tuj kiam mi ekvidis la eblecon pri malsukceso mi denove serĉis. Mi jam multe trakuris, kredu min. Mi vizitis apud La Flèche, grandan domon kiu povus konveni ; la prezo estis proksimume la sama ol tiu de Brûlon, sed la bieno estis en kamparo kaj ne sufiĉe alloga kaj plaĉa. Mi devas viziti la 18an de Oktobro du kastelojn ; la unua je 2 km. de Baugé, la dua en la urbo Baugé mem. Oni parolas al mi pri du milionoj kaj duono por unu, kaj tri milionoj por la alia.

En ambaŭ estus sufiĉe da loko por loĝi 50 personojn sen plia konstruaĵo. Mi komunikos al vi la rezulton de mia vizito. Ĉu vi opinias, ke oni povas elspezi 3.000.000 anstataŭ 2.500.000 ? Ni nun havas en la kaso 1.600.000 frankojn kaj 200.000 frankoj estas promesitaj.

CIRKULERO 2

Mi vizitis hieraŭ la kastelon Grésillon je 2 km. de Baugé (3.500 loĝantoj). Fervoja linio Paris - Le Mans - Saumur. Ekzemplo : Foriro el Parizo je la 19a, alveno en Baugé je la 22a kaj duono. Multaj aŭtobusoj el Angers kaj Tours. La regiono estas agrabla. La kasteloj de la Loire estas proksimaj. Malagrablaĵo por mi : la kastelo situas pli ol 50 km. de Epineux-le-Séguin. La kastelo estas belaspekta. Estas du etaĝoj kaj pli ol 20 ĉambroj. Lageto trapasita de rivereto. Oni povas aranĝi banejon. Vasta ĝardeno, kampoj, arboj. Ĉio estas ebla por la estonteco. Ne estas elektra lumo en la kastelo, sed la linio estas konstruita. Restas nur la interna instalado por fari. Por la akvo, estas puto, ni bezonos elektran motoron. Ne estas lavujoj en la ĉambroj. La bieno enhavas krom la kastelo, 13 hektarojn da kampoj, kaj 15 hektarojn da arboj. Oni petas 8.500.000 frankojn. Oni povas dispartigi la bienon, kaj aĉeti nur la kastelon kaj 8 hektarojn por 3.200.000 frankojn aŭ 3.300.000 frankojn. Mi fotografis la kastelon kaj mi preparas artikolon por « Esperanto-Lernejo ».

Jen la financa situacio :

en la kaso	1.664.900
promesitaj	316.000

Sindonema kamaradino metis je nia dispono 200.000 frankojn. Se ni trovus 10 aliajn, ĉio irus bone. Mia lasta alvoko alportis kelkajn monoferojn. Sed estos necese alvoki la esperantistajn grupojn se ni aĉetos la kastelon.

Eble S-ro Philippe povos veni.

La prezidanto :

H. MICARD.

Aldono : Estas varmiga hejtotubaro en parto de la kastelo.

CIRKULERO 3

S-ro Philippe venis la 2an de Novembro. Post longa rigardo li diris : « Mi admiregas ; estas por ni belega afero ». Kaj ni tuj ambaŭ decidis la aĉeton. Sed je la fino de la tago la vendisto postulis de ni 3.500.000 frankojn pro la vasteco de la bieno, kiun ni deziris. Ni ne akceptis, ĉar ŝajnis neeble elspezi pli ol 3.000.000 frankojn. La postan tagon mi denove traktadis kaj post longa diskutado pri la diversaj dikaj arboj disfaligontaj, mi sukcesis aranĝi la aferon por tri milionoj.

S-ro Philippe estis en Parizo. Li telefonis al mi la 4 an de Novembro je la 8a. Mi donis al li la detalon de la interkonsento kun la vendistoj kaj li donis al mi sian aprobon. Do mi subskribis hieraŭ vespere (4an de Novembro) specialan paperon kun la reprezentantoj de la vendisto, kaj nia kasisto S-ro Coussé, pagis per poŝta ĉeko la sumon de 1.500.000 frankoj.

Jen la kondiĉoj por la pago de la bieno :

hodiaŭ	1.500.000
15 Nov. 51	500.000
30 Nov. 51	500.000
15 Déc. 51	500.000
Sume :	3.000.000

Plie, ni devos pagi, kiel eble plej rapide la diversajn impoŝtojn : pli ol 700.000 frankoj.

Sed bedaŭrinde, tiuj kondiĉoj devas esti proponitaj al la posedantino, kiu deziris ricevi la tutan sumon la 30-an de Novembro. Mi ne povis promesi tion. Se la posedantino ne akceptos tion, oni redonos al ni la ĉekon, kaj ĉio estos rekomencota. La Ĝenerala Asembleo de la 16 a de Septembro donis al mi la necesan povon por trakti, sed tamen mi ŝatus ricevi vian aprobon. Mi asertas al vi, ke tio estas bonega afero, kiu ne estas komparebla kun Brûlon. Nun ni devas trovi la necesan monon Sro Philippe promesis helpi nin. Mi mem alvokos miajn esperantistajn amikojn. Agu same, kaj, se vi povas, montru la ekzemplon... »

CIRKULERO 4

« ... Fine ni interakordiĝis. Jen la kondiĉoj :

Kontanta pago	2.000.000
30 de Nov. 51	500.000
30 de Déc. 51	500.000
	3.000.000

kompreneble krom la impoŝtoj kaj 100.000 f-oj por maklera procentaĵo. Mi eksciis sabate (17 an de Novembro) ke ĉio estis aranĝita kun la posedantino. Mi pagis 2.000.000 frankojn. Mi kalkulas kun la promeso de U.E.F. por la pago de la 30a de Novembro. Mi esperas, ke mi povos pagi la promesitan sumon de la 30a de Decembro per la 262.000 frankoj, kiuj restas en nia kaso kaj la mono, kiu estas promesita de diversaj amikoj. Restas pagotaj la impoŝtoj kaj la maklera procentaĵo, je la fino de Januaro : 700.000 f-koj. Mi denove alvokas la Esperantistojn. Estas necese, ke la mono denove venu. Vidu viajn amikojn kaj viajn eblecojn. Agu ĉe la lokaj grupoj. Ni havas gravan respondecon. Sed, kredu min, ni havas belan bienon. Tio estos sensimila en la esperantista mondo.

Ĉu mi malpravis ? Mi ne povas pensi tion. La afero certe sukcesos se la entuziasmo ne malgrandiĝos. Restas ankoraŭ multo por fari, sed la rezulto meritas tion. Diru al mi, kion vi pensas. Mi bezonas scii, ke ĉiuj akompanos min ».

H. MICARD.

GABRIELA MISTRAL

Ĉilia poetino kaj homaranino,

Nobel — premiito

« Feliĉa mi estas, se je la fino de l'tago,
mi kunportas malplian malamon en mia koro,
se plia lumo gvidas miajn paŝojn,
kaj se mi forstrekis unu plian eraron ;
kaj se neniu ellasis plorojn
pro mia krudeco,
kaj se iu akceptis la ĝojon,
kiun mi tenere proponis al li. »

La poemaro de Gabriela Mistral, samkiel ŝiaj multnombraj prozaj artikoloj publikitaj ĉefe en la Latin-Amerika kaj Eŭropa gazetaroj, bildigas ŝian profundan fratecan kaj religian spiriton. Internacie laŭdata Ĉilia poetino, edukistino kaj diplomatino, Gabriela Mistral sin donis al la celo por paco kaj justeco, kaj dediĉis grandan parton el siaj verkoj al la ĉiurasaj patrinoj kaj infanoj. Ŝi, kiu neniam havis propajn infanojn, fariĝis la patrino de ĉiuj forlasitaj infanoj, la fratino de ĉiuj mistraktitaj virinoj kaj de ekspluatitaj laboristoj, kaj defendanto de la Indianoj, kies sorto estis kara al ŝia koro. Dum speciala akceepto de Papo Pio XII ŝi petis, laŭ sia karakteriza maniero, ke li preĝu por ĉiuj Indianoj de Ameriko. Laŭ ŝia esprimo, Indianoj estis « magneto », kiun ŝi kunportis en si mem. En ŝia poemo : « *Trinkante* », ŝi skribis :

« Sur la kamparo de Mitla,
sub ardega suno, elĉerpita kaj lacega,
mi klinis min super puto,
kaj Indiano venis por min subteni super la akvo
kaj mia kapo, kvazaŭ frukto,
estis inter liaj polmoj.
Mi estis trinkanta, kion li trinkis,
lia vizaĝo estis kontraŭ la mia,
kaj fulmrapide, mi eksciis,
ke lia raso kaj la mia estas unu ».

Mi havis la grandan privilegion persone koni Gabrielan Mistralon dum la lastaj jaroj de ŝia vivo ; kaj ankoraŭ post pli ol jardeko, mi povas vigle ŝin vidi : altkreska, majesta, humila kun la malriĉuloj, fiera kun la riĉuloj, kaj vestita laŭ la rigora simpleco de profeto. Mi memoras la belecon de ŝiajn okuloj, la pacigemon de ŝia varma rideto, kaj la aristokratan fajnecon de ŝiaj manoj. Ŝajnis, ke ne estas sekretoj antaŭ ŝiajn esplorantaj blueverdaj okuloj. Ŝia juna nevo foje nomis ŝin Budho, por signifi ŝian divenan komprenon de alies pensoj, kaj ŝian mediteman saĝecon.

Gabriela Mistral, kies vera nomo estis Lucila Godoy y Alcayaga naskiĝis en Ĉilio la 7an de aprilo 1889, en la valo Elqui, supre en la Andaj montoj. En 1945 ŝi ricevis la Nobel-premion pri Literaturo, la unua tia honoro iam atribuita al Sud-Amerikano. Tamen, ŝi ne ŝajnis konscii pri sia propra literatura valoro, nek pri sia spirita impreso al aliaj personoj. Ŝi malakceptis publikan laŭdon kaj preferis simplan kaj sinceran esprimon de amikeco. Ŝi ŝatis paroli pri sia infanaĝo en la vilaĝeto Monte Grande, kies aspekto multflanke similas bibliajn pejzaĝojn. Ŝia hejmo nutris ŝian poezian lingvon, ŝian profundan pasion por la tero, kaj ŝian mistikan alflugon al Dio.

Ŝia patrino, Petronila Alcayaga, ludis gravan rolon en ŝia elvolviĝo, donante al ŝi varman kaj amoplenan familian vivadon, kaj inspirante al ŝi amon al la naturo. La filino heredis multajn el la kvalitoj de la Vaskaj prapatroj de ŝia patrino, ĉefe obstinemo por la celo kaj perfekta honesteco. En sia infanaĝo, ŝi estis hontema kaj nekomunikiĝema ; sed poste, kiel ŝia patrino, ŝi evoluigis sian humoran senton. Ŝi ŝatis doni moknomojn al si kaj al siaj amikoj. Ŝia patro, Jeronimo Godoy y Villanulva estis kampara instruisto. Li havis eksterordinaran kapablon por improvizi poemojn laŭ la tradicio de la klasikaj Sud-Amerikaj *payadores* aŭ de la Hispanaj mezepokaj trobadoroj. Ŝia duonfratino Emelina Molina de Barraza, dekkvin jarojn pli aĝa ol Gabriela estis ankaŭ kampara instruistino, kaj fariĝis treege influa sur ŝia vivo. Tiel, estis nature ke Gabriela fariĝu instruistino. Kiam ŝi estis dekkvin-jara, ŝi sin dediĉis al instruado de malriĉaj infanoj dum la tago, kaj de laboristoj vespere. Kaj tiam ŝi klare komprenis, la gravecon kaj belecon de sia misio.

Gabriela ofte diris, ke ŝiaj du funkcioj estas verkado kaj instruado. Tra ŝia tuta vivo, ambaŭ iradis man' en mano. Kiel edukistino, ŝi altiĝis de la stato de instruistino en kamparaj lernejoj ĝis tiu de profesorino, poste direktorino en duagradaj lernejoj. Samkiel Sarmiento, Marti, Rodo' kaj Alfonso Reyes, ŝi alte taksis la junularon de Latina Ameriko ; kaj ŝi same emfazis la elvolvon de la animo kaj de la korpo. Ŝi grandanime leteris al junaj leviĝantaj verkistoj. Ŝi admonis ilin, ke ili konsciu pri la natura beleco de sia kontinento, kaj pri la famaj Latin-Amerikaj viroj kaj virinoj, en pasinta tempo kaj nune, kies vivoj estis plenigitaj de la Dia spirito. Ŝi admonis la verkistojn, ke ili verku pri temoj montrantaj la Latin-Amerikan landon kaj ties popolojn, kaj de ili inspiritaj.

Ŝi legadis kun vigla pasio, kaj la sola lukso, kiun ŝi permesis al si, estis aĉeto de libroj. Ŝi ofte aĉetis librojn de ŝi parkere konatajn, por la nura plezuro ilin donaci kaj oferti al junuloj. Tiel, ŝi ilin instigis legi la klasikaĵojn. Ĉar ŝi multe suferis, kaj sin mem instruis per konstanta serĉado pri kleriĝo, ŝi pleje amis helpi kaj gvidi la junulojn, kaj deziris, ke oni memoru ŝin ne kiel poetino aŭ diplomatino, sed kiel *maestra,* kampara instruistino.

Ŝia deziro realiĝis : oni memorigas ŝin en Ĉilio kaj en la tuta Latin-Ameriko, ne nur pro la literaturaj kapabloj ŝin famigintaj, sed ankaŭ ĉar ŝi estis apostolo por la malriĉuloj kaj subprematoj. Dum ŝia tuta vivo, ŝia hejmo estis ĉiam malfermata al ĉiuj, kaj ĝi ofte fariĝis refuĝejo por la malfeliĉuloj. El multaj landoj, vizitantoj venis vidi ŝin kaj trovis veran amikecon proponitan de etendita mano. En la poemo : « Donu al mi vian manon, ŝi skribis :

« Donu al mi vian manon, kaj ni dancos ;
donu al mi vian manon, kaj vi amos min.
Kiel unu sola floro ni estos,
kiel floro, kaj nenio pli.
.....
Via nomo estas Rozo, la mia Espero,
sed vi forgesos vian nomon,
tial ke ni estas unu danco
sur la monta supro, kaj nenio pli ».

Eble, ŝia unua impulso al verkado estis stimulita de ŝia deziro favorigi la spiritan kaj korpan elvolviĝon de ŝiaj lernantoj, ŝiaj infanoj, kiel ŝi nomis ilin. Kredeble, ŝia intereso al la infanoj, la vido de iliaj netaŭgaj lernolibroj, instigis ŝin verki por ili — ambaŭ poezion kaj prozon — Ŝi provis havigi al ili legaĵojn entenantajn belecon kaj spiritan kaj moralan mesaĝon.

Gabriela estis agnoskita unuafoje kiel poetino, kiam en 1914, ŝiaj poemoj estis elektitaj el kvar cent verkoj dum poezia konkurso en Santiago. Ŝiaj « *Sonetoj pri Morto* » havis novan kaj apartan kvaliton ; ili estis pasiaj, fortegaj kaj intimaj. Tiam estis reakcio en Latin-Ameriko kontraŭ la ĝenerala senpersoneca tipo de poezio. La verko de Gabriela kun tiuj de kelkaj aliaj poetinoj — Maria Eugenia Vaz Ferreira, Delmira Agustini, Juana de Ibarbourou, kaj Alfonsina Stormi — helpis tiun ŝanĝon. Tamen ŝi estis sendependa de ĉia grupo. Ŝi evitis la grandajn amasojn de personoj, kaj kelkafoje deziris, ke ŝi povu restadi la nekonata Lucila Godoy. Ŝi ofte diris : « Mi foriras for de la sukceso, kaj aliras al la komencantoj ». Kiam ŝi ne estis ankoraŭ tridekjara, ŝi konsideris sin kiel « amema avino de junaj artistoj ».

Oni multe parolis pri ŝia pseŭdonimo, Gabriela Mistral, kaj pri la influoj, kiuj motivis ŝian elekton. Oni ĝenerale kredas, ke « Gabriela » signifis por ŝi la ĉeeston de la spirito ; « Mistral », la amon, kiun ŝi havis por naturo, elvokata de la Mediteranea vento kune kun ŝia granda admiro por la Provenca poeto Frederic Mistral.

En la poemo : « *Miaj Libroj* » ŝi laŭdis kelkajn el la libroj kaj verkistoj influintaj ŝian vivon : la Biblio, sankta Francisko de Asizi, Amado Nervo, kaj Mistral. Sed ŝi estis sendube spirite tre proksima al Romain Rolland, Rabindranath Tagore, Emerson, Dostojevskij, Gorkij, Tolstoj kaj Turgenev. Inter la Hispanlingvaj verkistoj, ŝi havis certan rilatecon kun José Marti, Ruben Dario, José Enrique Rodo, Alfonso Reyes, Antonio Machado, Miguel de Unamuno, Juan Ramon Jimenez kaj Federico Garcia Lorca.

La unua kaj plej influa sanktulo en ŝia vivo estis sankta Francisko de Asizi. Ŝi elektis lin kiel sian specialan sanktulon pro lia tenera kaj infaneca personeco. Same kiel faris Juan Ramon Jimenez kaj Federico Garcia Lorca. Gabriela pensis, ke oni devas konservi sian internan junecon. André Maurois iam skribis : « Resti infano estas fariĝi poeto ». Ŝi kredis, ke naiveco kaj simpleco estas la du fundamentaj kvalitoj necesaj por atingi perfektecon en Dio kaj en sia propra laboro. Tial ŝi amis kaj protektis la infanojn kaj ĉiujn ilin similantajn. Ŝi emociiĝis pro la maniero laŭ kiu sankta Francisko tenis en siaj brakoj burĝonon de rozo, por ĝin helpi al floriĝo en belegan rozon. Ŝi deziris esti dotita de la sama amdono al ĉiuj estaĵoj, esti kapabla fari inter ili kiel li faris, kaj kiel abelo alflugas momente sur floron kaj pluflugas sur alian. La personoj, kiujn ŝi admiris, vivanta aŭ mortintaj, estis stoikaj kaj religiaj ; kiel sankta Tereza de Avila, la Hispana mistikulino de la 16-a. jarcento, al kiu ŝi ofte estis komparita. Miguel de Unamuno, samtempe Hispana poeto kiu verkis pri sia aspiro al la senfino, kaj Jacques Maritain, la katolika franca filozofo, kun kiu ŝi kunhavis senton de spirita frateco. Kelkajn semajnojn antaŭ ŝia morto en Hempstead Ŝtato de Nov-Jorko, la 10an de januaro 1957, ŝi havis longan konversacion kun Maritain, kaj ambaŭ parolis pri morto kaj eterna vivo.

Multaj Latin-Amerikaj verkistoj estas profesoroj, multaj estas diplomatoj. Gabriela estis ambaŭ ; ŝi estis petita en 1922, de la Meksika registaro por kunlabori pri edukaj reformoj kun la tiama Ministro pri Edukado, José Vasconcelos. Ĉar ŝi sin dediĉis al la infanoj de Ĉilio, same ŝi sin donis speciale al la afero de la Indianoj en Meksikio. Ŝi trarajdis la sovaĝajn altebenajojn kaj ĝisiris la pli neatingeblajn vilaĝojn. Ŝi mem organizis plenaerajn lernejojn kun instruantoj rekte venintaj el la plej foraj lokoj. Dum tiuj vojaĝoj, ŝi ofte vivis meze de la Indianoj, kaj ŝi tiam komprenis la belecon kaj grandecon de ilia tradicio. Ŝia restado en Meksikio, kvankam relative mallonga, faris grandan impreson sur ŝi, ĉar de tie ŝi unuafoje vidis Ĉilion perspektive, kaj konceptis la ideon pri Latin-Ameriko kiel unu granda lando. Ŝiaj spertoj en Meksikio fortigis la kredojn, kiuj estis fundamentaj por ŝi dum ŝia tuta vivo : amo kaj defendo de la Indianoj, la neceso de socia justeco, profunda konvinko, ke ĉiuj homoj kaj ĉiuj rasoj estas egalaj.

Gabriela eniris en la diplomata kampo en 1932 kiel Ĉilia konsulo en Madrido, sed en 1935, speciala leĝo estis eldonita de la Ĉilia registaro, kiu estigis ŝin konsulo *per vita*, kaj permesis al ŝi vivadi en kia ajn lando de ŝi elektota. Tiu leĝo estis decidita pro la sugesto de grupo de Eŭropaj verkistoj, kiuj sendis petskribon al la Prezidanto de Ĉilio petanta, ke oni donu al ŝi pagatan konsulecon por certigi ŝian ekonomian sekurecon. La subskribintoj estis Miguel de Unamuno, Guglielmo Ferreiro, Romain Rolland, Georges Duhamel, kaj Maurice Maëterlinck.

Ĉar ŝia laboro sur la diplomataj kaj edukaj kampoj vokis ŝin en diversaj landoj, ŝi forlasis Ĉilion en 1922, kaj neniam vivis en ĝi denove, krom dum kelkaj malmultaj tagoj en 1925, 1938 kaj 1954. Nur post sia morto, ŝi estos ripozonta en Monte Grande, la viliĝo tiom kara al ŝia koro. Tra sia tuta vivo ŝi sentadis amon kaj nostalgion al sia popolo kaj al sia *patria chiquita*. Mi memoras, kun kia varmeco ŝi parolis al mi pri la fruktoj, floroj, milda vetero de la amata regiono de sia junaĝo.

(daŭrigota)

Laŭ Marie-Lise GAZARIAN
Profesoro de Hispana Lingvo en Nov-Jorko
tradukis Eloi MOTILLON.

FANTAZIULO

El la memorajoj de Odette Pannetier
kiu estis fama ĵurnalistino

Sinjoro Goguillot ĝuis tute specialan plezuron : treni siajn samtempulojn antaŭ la Justicon : estis por li nepra bezono. Li estis dika viro, tre malbela kaj tre malpura ; iun tagon oni trovis lin en lia ĉambro — kiu aĉe odoris — serĉanta sub sia lito sian duan ŝtrumpeton, kiun li nepre bezonis por iri al Tribunalo ; ĉar li posedis nur du ŝtrumpetojn !

Li surportis larĝajn okulvitrojn kaj lia barbo tute similis glu-penikon.

Li ĉiam advokatis por si mem. Li gajnis 34 procesojn kontraŭ S.N.C.F. (tiama P.L.M.). Finfine la Kompanio opiniis pli avantaĝa lasi lin voĵaĝi senpage sur la tuta fervojaro, dank'al malnova bileto, ne plu valida.

Jen kelkaj heroaĵoj de tiu stranga fantaziulo, kiu preskaŭ genie inventis ŝercaĵojn :

Iun tagon li sidas en la bufedo de Avignonstacio ; li petas ŝink-tranĉaĵon ; oni ĝin alportas al li ; el sia poŝo li elprenas leterpesilon, sur ĝin metas la ŝink-tranĉaĵon kaj vokas la kelneron : « Tiu tranĉaĵo ne havas la pezon antaŭfiksitan en la Kajero de la Oficaĵoj ; tiu pezo devas esti 170 gramoj kaj tie ĉi estas nur 165 g. La kelnero prenas la teleron kaj post momento revenas kun alia ŝink-tranĉaĵo. Goguillot denove pesas kaj denove vokas : « Kelnero, tiu tranĉaĵo pezas 180 gramojn. Mi ne povas ĝin akcepti : estus ŝtelo ! » La bufed-estro finfine petegas lin, ke li akceptu senpage la tranĉaĵon !

Alifoje, en Tarascon, Goguillot envagoniĝis en trajnon preskaŭ malplenan — almenaŭ la kupeo en kiu li instaliĝas estas tia. Li konstatas, ke la pordo de tiu kupeo, pro maljuneco de la vagono, ne povas esti malfermita de interne. Do, li instaliĝas en tiu kupeo kaj kiam li alvenas en Parizon li igas konstati, ke oni ne povas malfermi de interne kaj li aldiras : « Mi devis pledi en Lyon (kio estis vere), sed, pro tiu ne malfermebla pordo, mi maltrafis mian aferon ». Oni provas klarigi al li, ke li povus elekti alian kupeon : « Permesu ! vojaĝi en tiu kupeo estas mia plej absoluta rajto ! La Kompanio devige devas disponigi al siaj vojaĝantoj bonstatajn vagonojn ! ».

Alian tagon li eniras en Deponejon, de mi ne plu scias, kiu stacio. Li portas dentopinglon, zorge enpakitan. La komizo aĉe protestas : « ĉu vi mokas min ? ». « Tute ne, tre digne diras Goguillot ; la Oficaĵa Kajero ne antaŭfiksis minimuman formaton por la deponaĵoj ! » Antaŭ ol foriri li diras al la konsternita komizo : « Kaj tre atentu : ne metu sur ĝin dikan kofron ! Estas dentopinglo, kiu estas kara al mi : delonge ĝi estas en mia familio ! »

Iun fojon en poŝtoficejo li alportas poŝtmarkon al kiu ankoraŭ tenas la blanka marĝeno, kiu ĝin borderas ; sur tiu marĝeno li estis skribinta per etetaj literoj la nomojn kaj adresojn de la ricevonto kaj de la sendinto : « Mi deziras ĝin sendi registrita, li miele diras. La poŝtisto reagas, kiel oni pensas.

« — Permesu, estas mia rajto la plej absoluta !

— Sed, Sinjoro, kie vi volas ke mi gluu la poŝtmarkojn necesajn al afranko ?

— Tio estas via metio, ne la mia ! Kaj tre atentu, ke mia poŝtmarko alvenu ne difektita ! »

Jen kio okazis en Tuluzo : en iu memorinda tago, tiel multe pluvis, ke sur la Kapitol-Placo estis vastaj flakoj : Goguillot instaliĝas apud unu flako kun bela pajlo-ĉapelo kaj fiŝad-ilaro. Kompreneble, tuj : homamasiĝo kaj interveno de policoj. « Pardono, diras Goguillot, nenia avertilo signalas ke fiŝado estas malpermesata en tiu loko ! Nu, ĉie, kie estas akvo oni povas esperi fiŝojn... »

Li estis tre juna, kiam li komencis tiun karieron de netimigebla ŝercemulo. Ekzakte en la tago, kiam li devis trapasi siajn juro-ekzamenojn.

Lia kunvoko precizis : « Je la 11-a, en la B-Konstruo ». Sinjoro Goguillot iris ĝis la Konstruo B, kiun li trovis tute okupita de farbistoj, kiuj ĝin renovigis. Videble eraro okazis ! Goguillot petis de la farbistoj, ke ili konstatu lian ĉeeston « antaŭ la B-Konstruo, je la 11-a ». Li momenton atendis kaj kviete foriris. Sekve de kio li sendis raporton al la Administracio en kiu li precizigis : « mi ĉeestis antaŭ la B-Konstruo, je la 11-a sed estas neakcepteble, ke mi trovis neniun por pasigi al mi la ekzamenojn ! »

Nu ! sensacia okazaĵo : oni organizis specialan sesion por la lernanto Goguillot !

Kompreneble, Goguillot opiniis, ke li ne devis kalkuli kun la bonvolo de la ekzamenantoj !

Hazardo volis, ke, en tiu tago, Kolonia Ekspozicio okazis en Montpellier. Kaj oni vidis, trairante la urbon por iri al la ekzamenejo, Sinjoron Goguillot, altesidantan sur kamelo sekvata de alia kamelo ; sur tiu ĉi sidis, tremanta pro timo, malgranda viro, nigre vestita : li estis la asignisto, kies rolo estis kontroli ĉu la demandoj proponitaj al Goguillot ekzakte figuris en la Programo.

Goguillot estis akceptita !

Ni povas nur bedaŭri, ke tiu fantaziulo ne vivas en nia nuntempo. Kiom da ekspluatindaj belaĵoj, li estus trovanta sur sia vojo.

POR VIA DISTRO

Ni memorigas al vi la regularon de nia konkurso 1971-72, kiu aperis en la numero 5 (Septembro-Oktobro).

Bonvolu sendi viajn solvojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun dum kiu vi ricevas la gazeton. Pro nia malfruo de la du lastaj numeroj, ni ankoraŭ akceptos ĝis la fino de Marto la solvojn de la 4 unuaj problemoj (n-oj 5 kaj 6).

UNUA PROBLEMO : (20 poentoj).

En la ĉi-subaj frazoj, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj.

Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estos forprenita po I poento por ĉiu vorto malĝuste trovita.

1) Mi ridas.... lia naiveco.

2) Li .... estas plene kulpa, tamen oni devas .... kompati.

3) Plibone ne.... ol.... tro multe (la sama vorto estas trovota).

4) Li sukcesis... monon el la grupo.

5) .... la naciaj lingvoj estas rigidaj, Esperanto.... estas senfine fleksebla.

6) Li kredas sukcesi kaj .... ridetas.

7) Li mal.... eraras sur la lingva kampo.

8) Multaj .... iras senatente antaŭ tiu bildo.

Atentu, ke la nombro de la punktoj tute ne akordiĝas al la nombro de la literoj de la trovotaj vortoj.

DUA PROBLEMO : (10 poentoj).

KAŜITA FRAZO

1 *Pastro*	8 *Acero*	15 *Gorilo*	22 *Saluti*
2 *Planedo*	9 *Tabulo*	16 *Konko*	23 *Vesto*
3 *Vindi*	10 *Hajlo*	17 *Lundo*	24 *Vespero*
4 *Lifto*	11 *Sopiri*	18 *Karoto*	25 *Sitelo*
5 *Krono*	12 *Skolto*	19 *Aleno*	26 *Lando*
6 *Satano*	13 *Kabalo*	20 *Resto*	27 *Vervo*
7 *Venki*	14 *Marto*	21 *Rento*	28 *Kolera*

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 28 literoj en la numerita vico formos tre interesan opinion de la eminenta nederlanda literaturisto Jan Greshoff (nask, en 1888) pri unu el la grandaj landoj de Eŭropo.

AMUZAJ PROBLEMOJ

(apartaj de la konkurso)

Solvo de la antaŭaj problemoj

Litera Enigmo

La kaŝita deklaro de la fama komikisto Danny Kaye estis : « Ĉiu virino povas fari el sia edzo aŭ amiko milionulo, se li jam estas multmilionulo ».

Vortplektado


La proverbo kaŝita en la 28 vortoj proponitaj estis : « Rano eĉ en palaco sopiras al marĉo ».

Nova problemo

KRUCVORTOJ

Horizontale. — 1. Senorda konfuzo (r) ; stadio (r). — 2. Iskia neuralgio. — 3. Malpliiga sufikso (r) ; papago (r) ; prefikso. — 4. Posteularo (r) ; taĉmento da soldatoj (r). — 5. Bela floro (r) ; dentoskrapa malutila besteto (r). — 6. Fantazia imagaĵo (r) ; japana poemeto (r). — 7. Verba finaĵo ; maldika intesta parto (r) ; ag-sufikso (r). — 8. Scienco pri riĉaĵoj. — 9. Ligotubero ; en ludkartoj.

Vertikale. — 1. Nerekta demanda pronomo ; ekstera aspekto de iu aŭ io (r). — 2. Steletforma signo. — 3. Numeralo ; devizo (r) ; lirika poemo (r). — 4. Poseda adjektivo ; rilatas al virino. — 5. Amaso ; instrumento. — 6 Malgranda ; inklina. — 7. Du trionoj de montra pronomo (r) ; maceru tekseblan planton ; verba finaĵo. — 8 Poemeto. — 9. Poeziverkisto (r) ; faroj.



GRAMATIKO PER BONHUMORO

Afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj)

La simpla O-finaĵo ne sufiĉas por precize esprimi tion, kion oni volas diri :

EKZ : KONSTRUO : ĉu ago ? ĉu aĵo ?

ni uzu : konstru**ado** ; konstru**aĵo.**

Malsimpla Derivado estas

— **uzo de Afiksoj**
(praavo, silentema, purigi).


— **kunmeto de radikoj**
(dormo-ĉambro, belaspekta, subaĉeti).



Ciutaga B.A.

— B.A. : lunde por la gepatroj, marde por la gefratoj, merkrede por la geinstruistoj, ĵaŭde por la malriĉuloj, vendrede por la malsanuloj, sabate por la bestoj ! Restis al ni la dimanĉo !

Kaj oni ĵus opiniis nepra B.A. por la « tria aĝo » — uloj !



Pripenso pri la kunludonto

— Ĉu viro ? ĉu ino ? ĉu artisto ? ĉu teknikisto ? ĉu eksedzo ? ĉu artaĵamanto ? ĉu dormbezonulo ? ĉu profitemulo ? ĉu virginindulo ? ĉu Terano ? ĉu Lunlibertempulo ? ĉu Marsa Konkeranto ?



Kompense

— Mia kara Marganjo, antaŭ kiam ni fariĝos geedzoj, mi devas konfesi al vi ion, kion certe vi malkovros : la Naturo faris min senharulo.

Tamen kompense, se plaĉas al vi, mi povas rapide iĝi ruĝbarbulo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 1 de 1972, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les ouvriers ont pris possession de Grésillon : menuisiers, plâtriers, chauffagistes, électriciens. Les travaux prévus doivent être terminés à la fin du mois de février pour permettre la remise en état avant les séjours de Pâques. Nos amis pourront donc encore cette année constater quelques améliorations. Rien de très spectaculaire puisque les transformations concernent surtout les chambres et que seuls les occupants de ces chambres pourront en profiter. Plus visibles seront d'ici quelques années les résultats du travail de notre ami M. Métivier dans le parc. Cette année encore notre samideano a utilisé au mieux les crédits accordés par le Conseil d'Administration. De nouvelles plantations d'arbres et d'arbustes viennent d'être faites qui embelliront encore le cadre du château, car nous pensons tous qu'il faut apporter des soins à l'écrin également. Le plaisir des yeux est le complément indispensable aux joies que procure le séjour à la M.C.E.

Le 19 mars, notre Assemblée Générale jugera des résultats obtenus en 1971. Cette année 1971 marquera deux records : celui des recettes « séjours » qui ont atteint 110.000,00 francs et celui des investissements qui ont dépassé 40.000,00 francs. Que sera l'année 1972 ? Nous avons déjà des inscriptions et des demandes, mais il est encore trop tôt pour en juger. Pour l'instant les programmes de Pâques n'ont pas l'air d'attirer la grande foule. Il reste encore deux mois et tout peut changer en peu de temps.

Pour cet été, en août, aux activités habituelles, viendra s'ajouter la photographie guidée par Françoise et Jean-Michel Leriche. Nul doute que les intéressés seront nombreux.

1971 a été un succès. Il vous appartient à tous que 1972 confirme ce succès. Nous vous attendons très nombreux.

P. BABIN.

Avant ou après le Congrès de NANTES, pourquoi ne viendriez-vous pas quelques jours à GRESILLON.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de Mme Albault, épouse du président de U.F.E., elle même excellente et active espérantiste. Que le Dr Albault et sa famille trouvent ici l'assurance que nous partageons leur peine.

LA REVUE

Les abonnements 1972 arrivent en grand nombre, la plupart du temps accompagnés de quelques mots d'encouragement, parfois d'une somme supplémentaire pour célébrer le 20e anniversaire de la M.C.E. Merci à tous.

Les retardataires de 1971 ont dû trouver sur la bande de la revue un petit rappel. Qu'ils se mettent vite en règle pour les revues qu'ils ont reçues. Que ceux qui, pour une raison ou pour une autre, ne désirent pas se réabonner nous le fassent savoir. Cela nous évitera des frais inutiles.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (suite)

G. Michaud (93)	15,00
G. Martinez (16)	15,00
J. Benistant (72)	15,00
Retraités Ens. (72)	15,00
E. Kohler (25)	15,00
J. Louys (25)	15,00
S. Guillou (22)	15,00
C. Martin (35)	15,00
L. Chasseriaud (17)	15,00
I. Nagy (Hongrie)	15,00
E. Richard (44)	15,00
J. Fourreau (69)	15,00
H. Kuhn (All. Féd.)	15,00
M. Valluet (45)	15,00
A. Fauvel (22)	15,00
S. Humm (84)	15,00
G. Prigent (45)	15,00
R. Mauchien (80)	15,00
M. Robert (95)	15,00
B. Grampp (67)	15,00
M. Lefèbvre (72)	15,00
A. Gimbert (19)	15,00
G. Gerrier (75)	15,00
J. Kraemer (78)	15,00
B. Vazon (79)	15,00
J. Vazon (79)	15,00
P. Laurent (16)	15,00
J. Philippeau (44)	15,00
G. Philipeau (44)	15,00
J. Schrapp (All. Féd.)	15,00
G. Brousse (75)	15,00
L. Reyneau (49)	20,00
J. Carré (69)	15,00
P. Fort (10)	15,00
M. Granier (38)	15,00
R. Olivaux (44)	15,00
O. Leduc (44)	15,00
P. Turbellier (44)	15,00
E. Plutniak (62)	15,00
Gr. Esp. Marseille (13)	16,00
E. Schertzer (39)	15 00
S. Lacroix (35)	15,00
S. Guillot (74)	30,00
R. Lloancy (Tunisie)	15,00
D. Captein (Pays-Bas)	30,00
J. Blok (Pays-Bas)	20,00
M. de Waard (Pays-Bas)	15,00
R. Slot (Pays-Bas)	25,00
A. Antoni (83)	15,00
B. Cheverry (49)	15,00
F. Garrigue (13)	15,00
F. Cadenel (13)	15,00
P. Lorenzini (13)	15,00
C. Chini (13)	15.00
A. Maslet (06)	15,00
S. Jacono (13)	15,00
P. Bariteaud (06)	15,00
L. Apcher (84)	15,00
J. Sassi (06)	15,00
H. Reymond (13)	15,00
H. Bourdelon (13)	15,00
R. Fraccioli (13)	15,00
D. Jurquet (13)	15,00
J.-M. Guillon (45)	15,00
A. Horault (49)	15,00
A. Lherbier (72)	15,00
A. Mathis (84)	30 00
A. Gente (84)	15,00
J. Got (05)	15,00
M. Tourre (84)	15,00
R. Motto (30)	15,00
K. Vaatanen (13)	15,00
J. Fagier (84)	15,00
R. Doury (93)	15,00
E. Chérie (14)	15,00
M. Heyrault (34)	20,00
P. Gitton (18)	15,00
F. Suchareau (75)	15,00
P. Boissou (75)	15,00
J. Barré (44)	15,00
A. Raulet (44)	15,00
A. Boyet (49)	15,00
M. Coussé (72)	15,00
Groupe Monaco	15,00
R. Lecoq (37)	15,00
M. Aude (37)	15,00
G. Lemonnier (92)	20,00
A. Legret (14)	15,00
Total	**1.381,00**

SERVICE - LIBRAIRIE

adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE, 49 - BAUGÉ — C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 8,00 Fr.

LIVRES D'ÉTUDE ET DISQUES

ABC d'esperanto (Waringhien)	4,00
Esperanto-Manuel (Warnier (avec corrigé)	9.00
Esperanto por Infanoj	3,00
Esperanto Vivant (Delaire)	32,00
Falsaj amikoj	3,50
Gvidlibro por ekzamenoj	3,00
Junulkurso (SAT-amikaro)	8,00
Junulkurso (complément)	3,00
Junulkurso : 5 disques d'accompagnement	12,00
Manuel d'Initiation (Thaillet)	2,50
Manuel d'Etude (Couteaux)	4,80
Manuel de perfectionnement (Couteaux)	4,50
Manuel de préparation à l'Atesto pri Kapableco (Ribot)	8,00
Ni parolu en Esperanto (Ribot)	6,00
Nos premiers pas en Esperanto (avec disque)	3,00
Paŝoj al Plena posedo	14,00
Por la praktikantoj (Babin)	8 50
Premier Manuel	2,00
Privilegia Vojo (Setälä)	6,50
Tra la Mondo : 6 disques, 7 livrets	86,70
disques seuls	42,00
livrets seuls	48,00

DCTIONNAIRES

Botanika Terminaro	4,00
Dictionnaire pratique (esp.-fr., fr.-esp.)	16,00
Dictionnaire français-esperanto (Léger-Albault)	23 00
Grand dictionnaire esper.-français (Waringhien)	40,00
Gvidlibro por Ekzamenoj	3,00
Lexique fondamental (Léger)	6,50
Naŭlingva etimologia leksikono (Bastien)	18,00
Plena Vortaro : malnova eldono	17,00
nova eldono	22,00
Plena ilustrita vortaro	145,00
Vocabulaire de poche (Bastien)	4,50
Vocabulaire (Duc. Goninaz)	12,00

LANGUE ET MOUVEMENT

Bona ŝanco (W. Borman)	20,00
Dialekto, dialektiko (Dalmau)	4,00
Dr Esperanto (Ziokowska) broché	7,00
relié	14,50
Elektitaj paroladoj (Lapenna)	20,00
Esperanto, fil d'Ariane (Delaire)	20,00
Fundamento de Esperanto relié	18.50
broché	14,00
Historio de la lingvo esperanto (Privat) (2 vol.)	13,00
Leteroj de Zamenhof (2 vol.)	30,00
Lingvo kaj vivo (Waringhien)	20,00
Lingvaj respondoj (Zamenhof) relié	11,00
broché	8,50
Naskiĝo de Esperanto-Domo	3,50
Planlingvaj problemoj (Gilbert)	6,00
Proverbaro esperanta (Zamenhof)	8,00
Vivo de Zamenhof (Privat)	10,00
Vojaĝo inter la tempoj (Kalocsay)	14,00
Zamenhofa Esperanto	20,00
Zamenhof (M. Boulton)	17,00
Zamenhof en sia tempo :	
Boulogne - 1905	2,60
Homaranismo	2.60
Aŭtografoj de Zamenhof	2,60

LITTÉRATURE

Amara pano (Darvas)	6,50
Aventuroj de pioniro (Privat)	10,00
Bill kaj lazuraj ekuloj (Goldoni)	4,50
Brulanta sekreto (S. Zweig)	4,00
Colomba (Mérimée)	4,00
El tero kaj etero (Pioro)	7,00
Eta princo (Saint-Exupéry)	29,00
Fabeloj de Andersen	17,50
Faraono (Prus), 3 vol.	30,00
Frisaj rakontoj	10,00
Fundamenta Krestomatio	19,00
Gaja leganto (Schwerin)	3,00
Pomoj kaj riveroj (Rosbach)	10,00
Homoj sur la tero (Engholm) **broché**	12,00
relié	16,00
Junaĝa verkaro (Privat)	7,00
Kanako el Kananam (Linton)	12,00
Karlo (Privat)	3,00
Karnavalo kaj Somnambulino (Immermann)	5,00
Kiel akvo de l'rivero (Schwartz)	20,00
Kiso de l'reĝino (Najibin)	5,00
Koloroj (Baghy)	5,00
Kombilo (Gabrielli)	4,50
Konversacia Literaturo	3,00
Malsata ŝtono (Tagore)	13,00
Maŝinmondo (Szathmari)	8,50
Marta (Orzesko - tr. Zamenhof	17,00
Martin Fiero	23,00
Marvirineto (Andersen)	12,00
Maskerado ĉirkaŭ la morto (Schwartz)	15,00
Mi amis junulinon (Trobisch)	9,00
Morto de trajno (Croft)	7,00
Naŭzo (Sartre)	19,00
Normandaj rakontoj (Maupassant)	25,00
Novaj vestoj de l'Imperiesto (Andersen)	12,00
Okuloj (Boulton)	10,00
Princo kaj Betty (Woodehouse)	3,00
Printempo de morto (Zihaly)	8,50
Romeo Julieta kaj la tenebro	10,00
Sep vangofrapoj (Aslanyi)	4,00
Specimene (Baupierre)	9,00
Taglibro de Ann Frank	16 00
Tartarin de Taraskono (Daudet)	12,00
Tempo-maŝino (Wells)	3,50
Tridek tri rakontoj	18.00
Tri verkoj de Volter	12,00
Verda raketo (Forge)	12,00
Vitralo (Francis)	8,00
Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud (Ribillard)	10,00

Vivo vokas (Engholm)	8,00
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari)	15,00
Vuk (Fekete)	8,00

POÉSIE — THÉATRE

Arĉoj (G. Mattos)	10,00
Ĉielarko (Baghy)	8,50
Dia Komedio (Dante)	85,00
Duonvoĉe (Maura)	8 50
Ekzilo kaj Azilo (Emba)	8,50
Esperanta antologio	21,00
Fajro sur mia lango (de Kock)	8,00
Ĝoja podio (Schwartz)	8,00
Floroj de l'malbono (Baudelaire)	14,50
Gajaj edzinoj de Windsor (Shakespeare)	3,00
Georgo Dandin (Molière)	5,00
Hamleto (Shakespeare ; trad. Newell)	15,00
Hamleto (trad. Zamenhof)	15,00
Humoroj (Auld)	10,00
Infana raso (W. Auld)	10,00
Kalevala relié	35,00
Kantoj kaj Romancoj (Heine)	26,00
Kontralte (Boulton)	12 00
Krioj el Mallumo (Svetinov)	5,00
Libro de amo (Peneter)	25,00
Mokindaj preciozulinoj	3,00
Nova Ezopo (Urban)	7,00
Nur tri koloroj (Urbanova)	8,00
Parnasa gvidlibro	12,00
Peer Gynt (Ibsen) relié	12,50
Pinta krajono (Rossetti)	8,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev)	7,00
Revizoro (Gopol)	6,00
Romeo kaj Julieto (Shakespeare)	3,00
Rozoj kaj Urtikoj (Thorsen)	9,00
Sen eliro — La respektema P... (Sartre)	10,00
Sen paraŝuto (Thorsen)	8,00
Soifo (Tarkony)	14,00
Sub stelo rigila (Hamri)	8,00
Sur la vivovojo (Logvin)	9,00
Ŝtupoj sen nomoj (Ragnarsson)	8,00
Tempesto (Shakespeare)	10,00
Topaz (Pagnol)	12,00
Unufingraj melodioj (Auld)	7,00
Vesperkanto (Adamson)	9,00
Virino ĉe la landlimo (Boulton)	12,00

HISTOIRE — GÉOGRAPHIE SCIENCES — VOYAGES

Aktualaj problemoj (I. Lapenna)	10,00
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (Neergaard)	17,00
Bela subtera mondo (Tell)	12.00
La dolĉa Franclando	25,00
Dorse kontraŭ la muro (Wybenga) relié	24,00
broché	15,00
De Parizo al Lazura marbordo	3,50
Elingita glavo (Verdiro)	7,00
Gvidlibro tra Parizo (Julieta)	13,00
Kon Tiki (Heyerdahl)	20,00
Infanoj ne konas limojn	5,00
Nepalo malfermas sian pordon (Sekelj)	18,00
Nobla korano	60,00
Princlando Andoro	9,00
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)	5,00
Roza Luksemburg (Holst)	8 50
Tio, kion mi kredas (J. Rostand)	3,00
Vivo de Gandhi (E. Privat)	12,00

DIVERS

Gaja kantaro		2,00
Comment former un centre culturel		3,00
Livres pour enfants (illustrés)		1,20
la série de 10 différents		10,00
Cartes postales de Grésillon	noires	0,50
	couleurs	0,60

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**